

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 13 * 29. Dec. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Esperanto kaj la Ligo de Nacioj.

(Vidu sur la dua paĝo.)

Riam migranto atingis altajn dum longedaŭra pilgrimado, li kutimas ekhalti momenton kaj returni siajn rigardojn laŭ la vojo, kiun li lasis post si. Kaj li ĝojas pri la progreso, kiun li faris, vidante ke la vojo postlasata pli kaj pli grandigas kaj la vojo ankoraŭ irota por atingi la celon je sama mezuro malpliigas, — ĝojas, ke lia stelo kaj lia bona sento igis lin eviti erarvojojn kondukantajn en abismon.

Ankaŭ ni, esperantistoj, alveninte je la fino de l' jaro 1920, faras bone direkti niajn rigardojn returnen por cerpi el la jam atingita progreso novan esperon kaj novan kuraĝon por nia laboro en la estonteco.

La jaro, antaŭ kies fino ni nun staras, komencis je sufiĉe malbonaj cirkonstancoj. Nia movado ankoraŭ ne funkciis, lamigite per la terura bato de l' militigo. Nur tie kaj tie ĉi kelkaj fervoruloj de l' militigo. Nur tie kaj tie ĉi kelkaj fervoruloj de l' militigo. Nur tie kaj tie ĉi kelkaj fervoruloj de l' militigo.

Sed iom post iom la aro de la fervoruloj kreskis, insligite per kelkaj neatenditaj sukcesoj: la rekomendo de Esperanto per la Sovjeta Registaro kaj la alpreno de Esperanto kiel internacia interkomprenilo per la Ligo de l' Eksbatalintoj. Poste okazis la kongreso en Hago, kiu rezultigis unikan sukceson; la revigligo de niaj institucioj kaj organizaĵoj, precipe la financa sanigo de UEA per la grandioza nobla donaco de ĝia bedaŭrinde tro frue mortinta prezidanto, s-ano Hector Hodler; la deziresprimado de la Mondligo de l' Internaciaj Asocioj; okazis plue oficialaj dekretoj de instruistoj pri enkonduko de Esperanto en lernejoj; okazis fine la rekomendo de Esperanto per dekono de 11 ŝtatoj ĉe la Ligo de Nacioj. Krom tio ni vidis fojrojn kaj firmojn utiligi Esperanton, vidis nian propagandon por Esperanto inter laboristoj, poŝtistoj, fervojistoj, bankoficistoj, vidis la fondiĝon de Internacio Katolika, kiu jam fervorege laboras. Kaj ni vidis ekesti belan revuon esperantistan „Esperanta Finnlando“ en lando ĝis nun preskaŭ nekonata al la cetera mondo, kaj — last not least — nian propran ĵurnalon, la ĉiusemajnan „Esperanto Triumfanta“, kiu jam akiris multajn amikojn en ĉiuj partoj de la tero kaj kiu esperas akiri kelkcentojn da novaj abonantoj en venonta jaro.

Do, tre bone progresis la Esperanta movado dum 1920, firme ĝi sekvis la rektan vojon, gvidate per la ne-erariga stelo de l' espero, ne atentante la logojn al flankaj vojoj. Pli grandigis la distanco de la elira punkto, pli proksimiĝis la fina celo, al kiu, same kuraĝe kaj same rekte kiel ĝis nun, ni direktu niajn paŝojn en

1921.

Al ĉiuj niaj samideanoj, precipe al niaj ŝatataj legantoj kaj kunlaborantoj, ni deziras per ĉi tio feliĉan kaj sukcesplenan

Bonegan Novan Jaron!

Pli da praktika uzado de Esperanto!

Kun surskribo „Pri praktika neprogreso de Esperanto“ s-ano Balkanyi el Budapeŝt verkis ĉi-sube presitan artikolon, kiu plendas pri nesufiĉa uzado de Esperanto en la praktiko kaj pri senmoveco en nia movado.

Certe li pravas, komparante nian nunan movadon kun la antaŭmilita. Sed li ne konsideras, ke la milito detruis multajn, en kelkaj landoj eĉ ĉiujn sukcesojn jam atingitajn per longjara obsina laboro. Post la milito ni devas preskaŭ ĉie komenci denove. Kaj la novaj sukcesoj, atingitaj en la mallonga tempo post la milito, certe pravigas la esperon, ke nun nova epoko de progreso, ankaŭ en la praktiko, ekkomencas por nia movado.

Je tio ni plene konsentas kun s-ano B., ke „la devo de ĉiu vera esperantisto estas subteni kaj helpi UEA kaj ĝian laboron“, ke ni devas „per ĉiu forto konstrui sur la organizacio de UEA“. UEA estas nia sola grava praktika organizaĵo. Per ĝi ni praktike uzu kaj uzigu Esperanton!

Ni atentigas ĉi tie pri eraro, kiu ekzistas en multaj rondoj de esperantistoj, kaj kiun ni jam kelkfoje rimarkis: oni kredas, ke la indikiita alta kotizajo al UEA estas nur por membreco; efektive tiu kotizajo entenas la abonon al „Esperanto“. Kvankam estas dezirinde, ke ĉiu membro de UEA estas samtempe abonanto de ĝia organo, tamen tio ne estas ebla al ĉiu, precipe al anoj de malbonvalutaj landoj. Tial ni atentigas, ke la nura membreco (sen abono) kostas en Aŭstrio 50 kr., en Polio 50 mk., en Finnlando 18 mk., en Germanio 16 mk. ktp. — sumo, kiun ĉiu vera esperantisto devus oferi por kiel eble fortigi nian plej gravan praktikan organizaĵon per sia membreco kaj mensubteno.

UEA kun 20000 membroj povus jam efike impresi la mondon: sed UEA kun 3—5000 membroj estas laŭ la opinio de la mondo nur malgrava asocieto. Tial, samideanoj, kiuj ne ankoraŭ estas membroj, tuj aliĝu! Ju pli UEA fortiĝos, des pli proksima estos nia celo!

Pri praktika neprogreso de Esperanto.

Estas malĝoja fakto, ke nia movado antaŭeniras per tre malgrandaj paŝoj; kaj, kion ni atingas en unu lando, ni perdas en alia. Ni legu la malnovajn Esp. gazetojn ĉu en 1908, ĉu en 1912, kaj ni legos pri samaj esperplenaj sukcesoj kiel en la hodiaŭaj. Nenia diferenco, preskaŭ nenia progreso. Ni rememoru ekzemple, ke en 1908, kiel multaj scias, samideano Fischer reprezentis 900 rumanajn esperantistojn ĉe la Dresden'a kongreso, kaj nun tute ne estas laŭ nia scio Esp. movado en Rumanio! Grandaj sukcesoj malnovaj, ekz. la Antverpen'a kongreso, la libra kaj grafikaria ekspozicio en Leipzig, teatro-prezentadoj ktp., ĉiuj forflugis, kaj ni konfesus, ke ili estis momentaj ekbriiloj, kiuj ne produktis rimarkindan forton praktike antaŭenŝovi la movadon. La disvastiĝo de Esperanto certe ne estas pli granda ol antaŭ 10 jaroj. La homaro multe pli scias pri ĝi, sed ĝiaj uzantoj ne estas pli multaj. Multaj novaj homoj lernis ĝin, sed same multaj forgesis kaj forlasis ĝin. Ekzemple la Hungarlanda Esp. Societo havis antaŭ la milito 500 membrojn nur en Budapeŝt, nun ne estas 50. Multfoje kaj multloke oni instruis kaj instruas en lernejoj kaj kursoj Esperanton, sen ia rimarkinda disvastiĝo. La plej multaj ne finlernas ĝin, forgesas ĝin, ne uzas ĝin.

Kie la movado ekzistas, tie ĝin subtenas ĉiam pli aŭ malpli multaj entuziasmoj. Nenie Esperanto vivas en la praktiko! Se en Hungario ne estus hazarde du-tri idealistoj, ne estus la Esp. vivo. En Rumanio nun ne troviĝas tia entuziasmo, kaj ne estas movado. Ŝajnas, ke la movadon subtenas kaj vivigas de tempo al tempo nur tiaj infekcioj, kiaj estas festoj, kongresoj, prezentadoj, paroladoj, kursoj, artikoloj, kaj poste denove la sama! Sed ĉio ĉi ne estas efektiva vivo. La sola vivsigno estas la korespondado; sed ĝi estas ankaŭ limigita kiel sporto, amatoraro, kiun oni praktikas por kelkaj jaroj; poste multaj serĉas aliajn amuzojn. Kaj la literaturo de nia lingvo ankaŭ ne estas sufiĉa praktikaĵo, ĝi plejparte estas nur amuzajo aŭ ekzercaĵo, nepre necese, sed tamen por kiu sole neniu praktikulo lernas nian lingvon.

La plej granda praktika vivo estas la organizaĵo de UEA, ĝiaj informservoj, servoj dum vojaĝoj, por komercistoj ktp. La devo de ĉiu vera esperantisto estas subteni kaj helpi UEA kaj ĝian laboron! Ĝi estis kaj estas la sola praktika propaganda argumento por nia movado. Sed ŝajne UEA-anoj fariĝas ankaŭ nur la pli-entuziasmoj; la granda amaso forrestas, ĉar ĝi ankaŭ ne estas ankoraŭ sufiĉe praktika. Ni devas per ĉiu energio fortigi kaj ampleksiĝi la organizaĵon kaj servojn de UEA, ĉar ĝi povus fariĝi grava faktoro de la mondinterrilato.

La grandega parto de la homoj ne estas idealista, sed praktika. Nia movado spite ŝajnajn sukcesojn restos ludajo por la plimulto, se oni ne uzos ĝin praktike. La ĝisnuna praktika uzo tute ne sufiĉas. Efektive, eble nur duonmil homoj korespondas, poŝtmark-interŝanĝas Esperantlingve, inter ili eble nur kvindek firmoj. Eble eĉ ne tiom.

Multaj firmoj, entreprenoj, banejoj ktp. jam „oficiale“ enkondukis Esperanton, multaj eldonis Esperantlingvaj reklamojn, katalogojn, afiŝojn, — multaj ankaŭ jam forlasis ĝin. Sed efektive ili ne uzis Esperanton. Enkonduki Esperanton signifis: se iu skribos Esperantlingve, ili respondos Esperante. Efektive tion ja farus hodiaŭ jam ĉiu firmo, kiu ricevus Esperantan leteron, sen antaŭa enkonduko. Vere, oni povus diri, ke oni povas jam nun kun ĉiu firmo, korespondi Esperante; oni certe ricevos respondon, oni devas nur komenci! Kaj ĉi tie kuŝas la baro de disvastiĝo praktika de nia lingvo: Neniu volas aŭ provas ĝin komenci. Same, kiel komence la homoj diris: ni lernos, se la aliaj scios — kaj nur entuziasmoj lernis ĝin, — same la institucioj, entreprenoj, firmoj ktp. diras hodiaŭ, ke ili uzos Esperanton, se la aliaj per Esperanto turnos sin al ili. Kaj ili ankaŭ forgesas, ke tiamaniere neniam komenciĝos la praktika uzo de Esperanto. Certe iom helpas la reklamado de firmoj, fojroj ktp. per Esperanto-gazetoj aŭ flugfolioj, prezaroj; sed nur jam esperantistoj, precipe entuziasmoj, turnas sin al ili.

La vera praktika uzo estus, se ni povus atingi, ke la firmoj, institucioj, oficejoj enkondukus reale Esperanton, t. e. ili korespondu per si mem tuj Esperante kun siaj eksterlandaj interrilatuloj kaj ne nur kun eblaj esperantistaj intereseuloj, delegitoj aŭ societoj. Precipe la malgrandaj nacioj devus kaj povus komenci. Ĉar ja la firmoj de grandaj nacioj, ekzemple Cook kaj Pilo en Londono, Ideal-skrubmaŝino en Dresdeno, dr-o A. Wander S.-A. en Bern k. a., ne komencos Esperante korespondi tiel longe, kiam ili ricevos la korespondadojn en sia nacia lingvo (angle, germane, france).

La malgrandaj nacioj devus ĉi tion komenci, kaj la granda malhelpaĵo estas, ke ĝuste tiuj ĉi ne riskas komenci ĝin kaj humile plue korespondas france, angle, germane ktp.

Tiamaniere la movado neniam enradikiĝos, ĝi limiĝos al entuziasmoj, idealistoj, al kunvenoj, kongresoj, poŝtkart-interŝanĝoj ktp., kaj nur kelkloke, ne daŭre, oni uzos Esperanton por iaj praktikaj, ne daŭraj celoj.

Ĉion ĉi fion multaj esperantistoj, ankaŭ multaj firmoj de malgrandaj nacioj scias, tamen ne okazas la ŝanĝo, kaj la progreso estas malrapida, ne sistema, laŭsorpita! La decidoj de niaj kongresoj limiĝas al interpel., lingvaj, organizaĵaj, amuzaj demandoj, ili krom spektaklo kaj reklamfarado ne havas ian efikon — certe ne ian daŭran al la ekstera mondo. Eĉ la urboj, kie estis la brilaj kongresoj antaŭmilitaj, jam preskaŭ forgesis ĝin. La Esperantiĝo preskaŭ ne estis pli longa ol la kongressemajno mem.

Ankaŭ la registaroj ne uzos, kiel ekkomencantoj, nian lingvon, kaj la ĝenerala enkonduko okazos ankaŭ nur tiam kaj tie, kiam kaj kie granda amaso postulos ĝin. Sed granda amaso postulos ĝin nur, se oni povos ĝin jam praktike uzi, kaj la praktika uzo — kvankam ĝi teorie jam nun estas, eĉ estis de la momento, kiam Esperanto aperis —, sed efektive estos nur post enradikiĝo en la amaso.

Ĉio ĉi estas do seninterrompa rondirado. Ja se la granda amaso ĝin jam uzos, oni eĉ ne bezonos ĝin ŝiate enkonduki!

Do oni pripensu serioze la tutan situacion! Se ni volas efektivan sukceson, se ni volas, ke la sorto de Esperanto ne dependu sole de kelkaj entuziasmoj, ke la movado ne vivu nur per infekcioj de periodoj al periodoj, ĉiuj devas serioze pripensi pri rimedoj aliĝi la nunan senmovecon.

Precipe kaj plej unue oni devas per ĉiu forto konstrui sur la organizaĵo de UEA kaj ĝian laboron, ĉiujn, ĉu ŝtatojn, ĉu institutojn, fremdul-oficejojn, komercajn oficejojn ktp. ktp., ke ili komencu en siaj eksterlandaj interrilatoj uzi Esperanton! Nur tiu ĉi vojo gvidos al la fina sukceso. Kaj tiun ĉi vojon ni devas serĉi kaj trovi! Ĉiu pripensu, provu kaj konsilu! Kun entuziasmo, idealismo sole ni ne sukcesos, ni devas praktike uzi kaj uzigi Esperanton!

PAŬLO BALKANYI, Budapeŝt.

Esperanto kaj Ligo de Nacioj.

La oficialigo de Esperanto progresas ĝoĝige. Post dekretoj de diversaj ministroj pri instruo de Esperanto en ŝtataj lernejoj, ni nun speras la fakton, ke oni jam serioze diskutas pri nia lingvo en la plej granda kaj plej grava ligo de l' nuntempo, la Ligo de Nacioj.

Oni eble supozas prave, ke UEA ĉefe tial transloĝiĝis al Genevo, ĉar ĝi povas tie per sia ĉeesto pli efike impresi la Ligon. Ankaŭ ni eble ĝuste divenas, ke nia eminenta samideano d-ro Edmond Privat fervore varbis inter la delegitoj kaj sekretarioj de la Ligo. Aŭdu ni, kion li mem raportas pri la afero en la decembra numero de „Esperanto“:

Ĉiuj esperantistoj ĝojos aŭdante, ke nia lingvo estis oficiale preparolanta ĉe la unua kunsido de la Ligo de Nacioj. Lashore, ĉe la momento finpresigis tiun ĉi numeron, ni povas doni al niaj legantoj, kiel Kristnaskan aŭ Novjarian bondeziron, la jenan tekston de rezolucio prezentita de dek registaraj delegitoj kaj de senatano Lafontaine en sia persona nomo (ĉar liaj belgaj kolegoj ne konsentis):

„La Ligo de Nacioj, konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj kaj la urĝan necesecon forigi tiun baron por helpi al bona komprenigado inter nacioj,

sekvas kun intereso la provojn je oficiala instruo de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj regnoj, anoj de la Ligo de Nacioj,

esperas, ke tiu instruado ĝeneraligiĝos en la tuta mondo, por ke la ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado, petas la ĝeneralan Sekretariaron, prepari, por la venonta kunsido, detalan raporton pri la rezultatoj atingitaj en tiu fako.“

Sekvas la subskriboj de jenaj delegitoj:

Lord Robert Cecil (Sudafriko)
Octavio (Brazilo)
Lafontaine (Belgio)
Wellington Koo (Ĉina)
Huneus (Ĉilio)
Restrepo (Kolombio)
L. M. princo de Nawanager (Hinda)
Doret (Haitio)
Schanzer (Italio)
L. M. Emiro Zoka ed Dowleh (Persa)
Beneš (Ĉeĥoslovakio).

Tiu teksto estis presigita kiel dokumento n-ro 194 de la kunsido kaj disdonata al ĉiuj anoj de la Ligo de Nacioj. La 11. decembro ĝi estis legata france de la Prezidanto kaj poste angle. Estis decidite, ke tiu rezolucio estu pristudata de la Komisiono n-ro 2 (teknikaj aferoj).

La komisiono studis la proponon kaj prezentis tre favoran raporton rekomendante oficialan enketon pri la instruado de Esperanto. La 18. dec., ĉe la lasta ĝenerala kunsido, s-ro Lafontaine legis la raporton. En la nomo de la franca delegitaro, s-ro Gabriel Hanotaux ĝin kontraŭbatalis elokvente, postulante por la franca lingvo la rajton je tiumonda oficialeco. Li petis, ke oni ne permesu diskuton pri ĝi. Tuj la prezidanto, s-ro Hymans (Belgio), kiu estas konata kontraŭulo de Esperanto, voĉdonigis pri la sendiskuta prokrasto de la tuta afero. Post konfuzo baloto, dufoje rekomencita, per levigo kaj sido, li proklamis la prokraston. Tiel neniu subtenanto povis eĉ paroli. Ni raportos pli detale pri tio en nia venonta n-ro.

La Senlingvulo.

Redakto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝtidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (9-a daŭrigo.)

Fine la vaporŝipego estis alirita al la bordo. Iu ŝipano, kiel diablo lerta, grimpis supren, sub la tegmenton de la ejo kaj poste tuj ekbalanciĝis en la aero kune kun ponteto, kiu malleviĝis ĝis la vaporŝipo. Post tio la pasaĝeroj komencis elŝipiĝi sur la amerikan teron . . .

Malĝojon sentis niaj Loziŝanoj . . . Ili ankaŭ eliris sur la bordon, — ne estis do eble por ĉiam resti sur la ŝipo. Sed, por diri la veron, Mateo tiam pensis, ke sur la ŝipo estis por ili pli bone. Oni ŝipveturas, kaj tio estas ĉio . . . Cielo, nubetoj, maro, libera vento, kaj antaŭe, trans la horizonto — kion donos Dio . . . Certe ĉi tie ili havas antaŭ si teron, sed por kio? Ĉiujn pasaĝerojn iu atendas, kisas, plorante ĉirkaŭprenas; neniu nur venis renkonte al niaj Loziŝanoj, kaj ili devas iri solaj por serĉi sian nekonatan sorton. Sed kie ĝi estas, kien iri, kien serĉi, kien meti la piedon, ĉio ĉi restas nesciata. Jen staras la Loziŝanoj en siaj blankaj kiteloj, en grandegaj botoj, altaj ŝafelaj ĉapoj kaj kun grandaj bastonoj en la mano, bastonoj faritaj de iliaj salikoj, kiuj kreskas super la hejma rivereto, — staras konfuzitaj, kaj la knabino kun sia paketo sin alpremas al ili.

VI.

„Hebreoj! Je Dio! Mortigu min fulmotondro, se tio ne estas hebreoj!“ subite kriis Dima, montrante sinjonon en ronda ĉapelo kaj mallonga eluzita jaketo. Kvankam apud tiu staris juna sinjoro

Ni ne havu senutilajn iluziojn. Multo restas ankoraŭ farota. Esperanto nur komencas ekvivi la intereson de la oficialaj randoj. Ĉe la Ligo de Nacioj ekzemple multaj anoj devas esti varbataj al favoro.

Ni do laboru kaj esperu senlace. Neniam la tempo estis pli favora. La 15. dec. ni ĉiuj honoris la karan memoron de nia majstro Zamenhof. Lia penso nin inspiru konstante!

La perfekta interpretisto.

En „Daily News“ (Ĉiutagaj Novaĵoj), Londono Manchester, de 14. dec. s-ro H. Wilson Harris priskribas, sub titolo „The Gift of Tongues“ (La donaco de la lingvoj), diversajn specojn de interpretistoj: interpretisto kun „terpomo“ en la gorĝo; interpretisto kiu foruzas valoran tempon per netolerebla medito pri esprimoj; interpretisto kiu tradukas je sufiĉa indifereco pri la originala sencu de la parolado; interpretisto kiu estas interrompata per protesto de oratoro pretendanta, ke li parolis lute diference.

Poste la aŭtoro de la artikolo citas perfektan interpretiston aŭ almenaŭ kiu ne estas malproksima de la perfekteco:

Lastasemajne okazis surprizaĵo. S-ro Barnes (en la kongreso de la Ligo de Nacioj en Genevo) faris notindan paroladon pri la interrilato inter Polio kaj Sovjet-Rusio. Lia parolado . . . estis emocia kaj impresa, kaj ĉiu en la kunsido, komprenante angle, ekaplaŭdegis impulsive, kiam la oratoro finis kaj eksidis. Tiam la interpretisto ekstaris. Li ne nur tradukis; li reproduktis ne frazojn, sed senton, atmosferon, alvokon.

Nun la aŭtoro priskribas la mirigan interpretadon, je kies fino la delegitoj komprenantaj nur france aplaŭdegis tiel spontane, tiel daŭre kaj ĝenerale, kiel la anglingvaj delegitoj estis aplaŭdintaj la originalan paroladon.

Tia efiko de interpretado okazis nur unufoje antaŭe en la kongreso, kiam la sama interpretisto, en la malferma semajno, brile reproduktis francalingve la grandan paroladon de Lordo Robert Cecil.

Kaj kiu estas tiu nekomprenbla, ideala interpretisto? Kaj kia la sekreto de lia sukceso?

Ni esperantistoj povas esti fieraj, ke tiu eksterordinara homo estas neniu alia ol nia eminenta samideano d-ro Edmond Privat, al ni jam delonge konata kiel brila oratoro.

Kaj kia estas la sekreto de lia sukceso?

Jen kion skribas s-ro H. Wilson Harris:

Okaze mi kunesitis kun Lordo Robert Cecil ĉe la fino de la kunsido, en kiu li faris sian supre cititan paroladon. Kiam ni interparolis, d-ro Privat pasis, kaj Lordo Robert sin turnis por varme danki lin pro la farita servo. „Ho“, li respondis, per klariganta frazo, „la koro estis ĉe tio!“ Jen kio klarigas multon!

La aŭtoro finas: Sufiĉe strange estas, ke d-ro Privat estas entuziasma pioniro de Esperanto, kiu estas eksigonta lin fine de lia negoco.

Sub titolo „La plej grava viro en Genevo“, la „Hallische Nachrichten“ (Sciigoj de Halle) raportis pri la sama sukcesego de nia samideano.

Deklaracio de la Akademio.

(Decembro 1920.)

En la antaŭa numero estis eligitaj kelkaj erareroj. Legu en 2-a kolono, linio 87: por (anst. per); 3-a kolono, linio 41: precize (anst. precipe).

2. Difino kaj devoj de la Lingvaj Institucioj.

La Lingva Komitato kaj ĝia Akademio ne havas la rajton iniciati iun ŝanĝon, korekton

eto en tute nova laŭmoda kostumo, laŭaspekte tute ne simila al hebreido, tamen, kiam la malpli juna sinjoro sin turnis, tiam ankaŭ Mateo ĉe la unua rigardo konvinkiĝis, ke tio nepras estas hebreo, hebreo ĝuste el ilia hejmo, el apud Mogilevo, aŭ Jitomiro, Minsko aŭ Smolensko, kvazaŭ li ĵus venis de la okcidentusa foiro, nur ŝanĝinte por eŭropaj vestoj sian nacian kostumon.

Vidante tiun viron, ili ekĝojis, kvazaŭ tio estus ilia parenco. Ankaŭ la hebreo, rimarkinte la blankajn kitelojn kaj ŝafelajn ĉapojn, tuj sin direktis al ili kaj salutis ilin:

„Bonvenon! Kiel vi fartas, sinjoroj? Mi jam vidas, ke vi estas miaj samlandanoj.“

„Jen!“ triumfe diris Dima. „Ĉu ne prava mi estis? Bonegaj homoj estas la hebreoj! Kie oni ilin bezonas, tie ili jam estas. Bonan tagon, sinjoro hebreo, vian nomon, pardonu, mi ne konas!“

„Ha! Antaŭe mi estis Boruĥ, nun oni min nomas Bork. Mr. Bork, servopreta,“ diris la hebreo, iom fiere karesante al si la barbon.

„Bone! Nu, aŭskultu do, Berko!“ . . . „Mr. Bork,“ korektis la hebreo kun ankoraŭ pli granda fereco.

„Nu, estu tiel, mister, Mr. Bork, diablo vin prenu . . . Ĉu ni povas havi ĉi tie bonan gastejon, ne tro multekostan kaj, kompreneble, ne tro malbonan? Ĉar vi devas scii . . . Kvankam en vulgaraĵo kiteloj, ni ja ne estas simplaj vilaĝanoj . . . Krom tio, kiu ni estas knabino, kiel vi vidas . . .“

„He, ĉu mi mem ne scias diferencigi la homojn?“ diplomatie respondis Mr. Bork. „Kion do vi pensas pri mi? He, he! Mr. Bork estas malsaĝulo, Mr. Bork ne konas la homojn . . .“

8) Mr. = mister — angla vorto = sinjoro.

9) Tiel la rusaĵo vilaĝanoj malsate kripligas la hebrean nomon Boruĥ.

aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn; ili devas nur konstati, kontroli, elekti, konsili, rekomendi aŭ malrekomendi: ili estas nur ordigiloj, modrigiloj kaj reguligiloj, kiuj celas konservi la necesan unuecon kaj harmonion.

La rolo de la Lingva Komitato kaj de la Akademio ne dependas de la plaĉo de iliaj anoj, nek de la okaza ŝangebla opinio de iuj esperantistaj grupoj aŭ kongresoj. Tiun rolon, tre klare kaj precize difinitan per la Fundamento, — kiu estas konstitucia leĝo por ĉiu Esperantisto, — per la Fonda Regularo kaj per la Zamenhofaj komentarioj kaj konsilioj, devas akcepti ĉiu Komitatano kaj Akademiano.

Kreante la lingvan Komitaton kaj la Akademion, la Esperantistaro konigis sian precizan celon kaj firmam volon, deklarante, ke ĉi tiuj institucioj estas komisiitaj „por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucio“ (Regularo).

Sekve la rolo de la Akademio, kiu estas nur organizantaro por la laborado de la Lingva Komitato kaj de la prilingvaj nekomitatanaj kompetentuloj, estas, tute same, kiel tiu de ĉiuj Akademioj en la mondo, rolo esence konserva: la Akademio devas unue malhelpi rompon de la fundamentaj gramatikaj reguloj kaj malrespekton de la fundamenta vortaro; due ĝi devas zorgi, por ke la evoluo de la lingvo farigu laŭ la principoj, reguloj kaj instrukcioj entenataj en la fundamentaj dokumentoj.

La signifo de la vorto *kontroli*, uzata en la Fonda Regularo, ne estas duba: „kontroli“ estas „explori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti“ (Vortaro de Bejn). Komprenble tiu ĉi esploro estus tute vana teoria laboro kaj senutila batado de vento, se ĝin ne sekvus efektiviĝaj konsilioj kaj admonoj. La Fundamento de Esperanto estas je la dispono de ĉiu Esperantisto kiel „konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankigado de la vojo de unueco“ (Antaŭparolo de la Fundamento); sed tiu kontrolilo estas senaga, inerta, pasiva, ĝi estas nur ilo, kiun oni povas uzi aŭ ne uzi. Facile, eĉ senintence, oni povas malzorgi ĝin, forgesi ĝiajn ekzemplojn. La Akademio estas aganta, vivanta, aktiva kontrolanto, kiu kvazaŭe vivigas, efikas la Fundamento kaj efektiviĝas en la praktikaj ĝiaj principoj.

La kontrolo de la Akademio, ne forprenante la liberecon de ĉiu Esperantisto, nek barante la normalan naturan kaj laŭnature internacian evoluadon kaj pliriĉiĝadon de la lingvo, tamen konservas ĝian severan unuecon, kaj gardas la Esperantistojn de blinda kaj senkritika alproprigo de eraroj, de malkorektaĵoj, de novaj necesegaj, neutilaj kaj nesufiĉe internaciaj radikoj, aŭ de naciaj apartaĵoj kaj *idiotismoj*, kiuj ne estas internacie aŭ almenaŭ sufiĉe ĝenerale komprenblaj. Ne deprenante de ĉiu Esperantisto „la eblon kritike proprigi al si ĉiujn riĉiĝojn kaj regule faritajn perfektigojn, kiujn li trovas en la literaturo“, la Akademio devas esti konstanta helpanto, informanto kaj konsilanto de ĉiuj Esperantistoj kaj precipe de la verkantoj kaj de la gazetoj, senlace rememorigante al ili la necesan disciplinon, la fundamentajn principojn kaj la neprajn kondiĉojn de internacia lingvo, ebligante al ili la necesegan kritikon, refoje postulitan de Zamenhof, kaj la elekton inter relative internaciaj kaj nure naciaj radikoj, inter apartaj naciaj idiotismoj kaj internacie ĝenerale komprenblaj esprimoj, ĉar la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en iu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene *egale*“ (Antaŭparolo de la Fundamenta Krestomatio).

jen kion mi diros al vi: estas via grandega feliciĝo, ke vi tuj trovis Bork-on. Ne ĉiutage mi ja vizitas la albordigejon, por kio mi vizitus ĝin ĉiutage . . . Sed ĉe mi vi tuj trovos belan rifuĝejon, kaj ankaŭ por la fraŭlino ni havos apartan ĉambretan, kune kun mia filino.“

„Tio estas ja bonega!“ kriis Dima kaj fiere ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ li mem estus elpensinta tiun mister-on Bork. „Nu, montru al mi vian belan rifuĝejon.“

„Eble vi havas ankoraŭ pakojn por prizorgi?“

„Ne! Kiun pakojn? Por diri la veron, ni ĉion kunportas.“

„He! Ne tro multe. John!“¹⁰⁾ Li kriis al la juna sinjoro, kiu efektive montrigis lia filo. „Kial vi staras kiel malsaĝulo? Prenu la pakojn de la fraŭlino!“

La juna sinjoreto tute ne estis fera. Li ĝentile salutis sian ĉapelon, prenis el la manoj de Anna la paketon, kaj ili ekiris.

Ili irapasis unu straton, eniris en alian, kiu ŝajnis al la novalevenintoj ia kaverno. Mallumaj, altaj domoj, mallarĝaj pordegoj; super la strato, samnivele kun la duona alteco de la domoj, treniĝas relvojo, baranta la ĉielon.

„Dio! Sankta Dipatrino!“ subite kriis Anna, terurite kaptante la manon de Mateo.

„Ĉiu animo laŭdu Dion!“ diris Mateo, „kio ĝi estas?“

„Ha, ha, kial vi ektimis?“ diris la hebreo. „Tio estas nur vagonaro. Nu, iru, iru, estas malgravaĵo . . . La vagonaro iru sian vojon, ni — la nian. Ĝi nin ne fuŝos, ni ĝin ne fuŝos. Ĉi tie, — mi ja diras al vi, — ni vivas en tia lando, kie oni ne kutimis perdi la tempon.“

(Daŭrigo.)

10) Angla nomo, elpar. ĝon.

Esperanto-Movado en Polio.

BROMBERG-Bydgoszcz. En la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo Esperanto bonege progresas. S-ro Pankratz finis kurson kun 40 personoj. En Siemiecnek ĉe Bydgoszcz kurso kun 25 partoprenantoj. — Urbaj gazetoj kiel „Deutsche Rundschau“, „Volkszeitung“ kaj „Nowe Tory“ skribas multe pri Esp. „Nowe Tory“ (organo de prof. Kronenberg) pli kaj pli fariĝas nacia Esp. gazeto. La n-ro 13, en kiu ĝia redaktoro publikigis en Esp. teksto alvokon „Al ĉiuj Kristanoj de l' tuta mondo“, oni elsendis en kelkmil ekzempleroj al ĉiuj delegitoj de UEA, redakcioj de Esp. gazetoj ktp. — La ĉi-tiea katolika Esp. grupo „Antaŭen kun Kredoj“ aranĝis en „Dom Polski“ (Pola Domo) Esp. propagand-vesperon. Paroladoj faris s-ro prof. Kronenberg; sekvis deklamacio „La vojo de d-ro Zamenhof“ dirita de f-ino Jendrzewska kaj alio esperantigita el pola opero „Helka“, kantita de f-ino Kreffl. Je la fino parolis ankoraŭ s-ro prepozito Becker, fondinto de grupo „Antaŭen kun Kredoj“. Kunigita kun tiu aranĝaĵo estis ekspozicio de Esp. literaturo, gazetoj kaj kartoj, kiun bone aranĝis s-anoj Prengel, Derengowski kaj Kowalewski. Interalie oni trovis 70 diversajn gazetojn el 25 landoj.

CZESLOHOVA. Ĉi tie troviĝas jam 56 bone parolantaj esperantistoj. Propagandas s-ro Karmiol. KRAKOW. La Komercia Cambio alprenis Esp. por la eksterlanda korespondado.

LODZ. En ĉi tiu urbo troviĝas jam pli multe ol 5000 (?) esperantistoj. „Lodzer Zeitung“ alportas semajne longan priesperantan artikolon.

SIEDLCE. Fervore propagandas reveninta el la milito s-ano Czes. Pruski.

WARSAWA. En la ministerio troviĝas Esp. ministro, s-ro Alfons Wierzbiet, vicministro de la saneco. (Speciala Raporto per ET de F. P.)

UEA en VARSOVIO. La 18. nov. alveturis Varsovion hungara delegacio, inter kiu troviĝis ankaŭ nia malnova s-ano prelato Aleksandro Giesswein. Por honoro tiun eminentan gaston, estis kunvokita kunveno en la loĝejo de s-ano d-ro Robin; ĉeestis s-ino Zamenhof, d-ro Leono Zamenhof k. a. La akceptparolon havis d-ro Zamenhof, kiu klarigis la meritojn de la ŝatata gasto. Respondis prelato Giesswein, transdonante saluton en nomo de hungaraj samideanoj kaj rakontante pri la sukcesoj de Esperanto eksterlande. Poste parolis ankoraŭ d-ro Robin. — Interalie s-ro Giesswein vizitis s-ron Essigman, kies ankaŭ kolektiĝis granda anaro kun la prezidanto de Pola Esp. Societo. Al s-ro prelato Giesswein estis farataj multaj servoj, kaj, dank' al la afableco de d-ro Robin, UEA povis disponigi aŭtomobilon al la gasto kaj vehirigi lin al diversaj lokoj. (A. G.)

Societa vivo.

BUDAPEST. La 15. dec. estis bone sukcinata Zamenhof-Vespero en la IX-a distrikta laborista hejmo. La tiea grupo ŝajne estas tre vigla kaj vivforta! — La 17. dec. estis simila festo en la Socia Muzeo aranĝita per la Landa Societo, kiu montris veran esperantistan kunlaboron: pro manko de hejmmaterialo la samideanoj kunportis sub la brako, sur la dorso, en valizoj karbon aŭ lignon por hejtigi la ĉambregon. Kunvenis proksimume 100 personoj, la ĉambrego pleniĝis. Malfervis la feston esperantlingve per interesa, entuziasma parolado d-ro Leono Lorand, poste parolis hungare Adalberto Szasz. La poemon „Je la naskiĝotago“ de d-ro Kalocsaj deklamis Jozefo Major. La malnovan Esp. rakonton pri „La filino de la felinoj“ laŭlegis hungare f-ino Irma Lederer. Originalan poemon deklamis d-ro Kalocsaj, ekzemplon el la diverspecaj literaturajoj esperantigitaj laŭlegis Paŭlo Balkanyi, kiu kun J. Major prezentis malgrandan gajan teatraĵon, en kiu oni ne vidis aktorajn sur la sceno. La vespero finiĝis post deklamo de gimnaziano Johano Balkanyi per kanto de la himno.

MAINZ (Germ.). La 9. jan. 1921 okazos ĉi tie provizora preparolo de la kunlaborantoj de SOL. Detalojn pere de s-ro F. Pfaff, Worms, Sebastian-Münsterstr. 32.

HAIDA (Ĉeĥoslov.). La „Mittellungen“ (Sciigoj) raportas pri kursoj kun entute pli ol 300 partoprenantoj en sekvantaj lokoj de la germanlingva parto de Ĉeĥoslovakio: Bensen, Briix, Dux, Dauba, Grottau, Krochwitz, Königshof, Leitmeritz, Mähr-Schönberg, Oderfurt, Tetschen-Bodenbach kaj Trautenau.

LIVERPOOL (Angl.). Grupo Esperantista de Liverpool. — Kunveno okazas ĉiusemajne. La sezono malfirmiĝis per lumbilda parolado. Ĉiukunvene la anoj diskutis interparolan temon, kaj poste unu el ili priiraktas specialan temon. — Je la 13. dec. okazis Zamenhofa Soleno, havante formon de sociala kunveno. Pli ol 50 interuloj ĉeestis. La programo konsistis el kantoj, deklamoj kaj paroladoj, kaj en la intertempo oni servis teamangeton. — Lastatempe oni fondis novan kurson en Birkenhead, kiu ĉeestas 20 lernantoj. Tiu estas la sesa kurso en la regiono. (T. R.)

OPPELN (Supra Silezio). La Esp. movado ekfloras. Granda parolado de s-ano Knopf el Beuthen antaŭ 400 homoj. Post la parolado kantoj en naciaj lingvoj kaj Esperanto kun liuta akompanado. Poste diskutado kaj bone propagandanta Esp. ekspozicio. Enskribiĝis ĝis nun 80 kurs-

partoprenantoj. Antaŭ kaj post la parolado favoraj artikoloj en la lokaj germana kaj pola gazetoj. — Oni disdonis sur la stratoj kelkajn milojn da pri-Esp. flugfolioj. Multe propagandas la Esp. afiŝoj elpendigitaj en diversaj elmontoj kaj publikaj ejoj. En januaro okazos specialaj paroladoj kaj kursoj por la laboristaro.

LOS ANGELES (Kalifornio). Organiziĝis societo de litovaj esperantistoj. Adreso: B. Ling, 1519, Tansey ave.

Laboristaro.

MÜNCHEN (Germ.). Per fervora propagando ni entute povis akiri 160 novajn gelernantojn. Samtempe ni povis efektiviĝi, ke Esperanto estis akceptata en la instruada plano de la ĉi tie tiel preferataj „Akademijaj Laboristaj Kursoj“. Ankaŭ lernejan ĉambregon por Esp. kurso ni ricevis. Nia grupo serĉas fidelajn gekorespondantojn en ĉiuj landoj per adreso: Konrad Deubler, Arcisstr. 48, München (Bavario, Germanio). Munkena Laborista Grupo Esperantista.

Lernejo.

LEITMERITZ (Ĉeĥoslov.). D-ro Hicel instruas en gimnazio 15 lernantojn.

BUDAPEST. Sekve de ministeria ordono por la ŝtatlernejoj, direktoro Arpadó Ravasz de la budapesia kalvinana ĉefgimnazio petis laŭ instigo de profesoro kand. Arpadó Illyefalvy-Vitez la episkopon de la ĉedanuba kalvinana eklezia distrikto, ke simile oni povu instrui ankaŭ en la kalvinanaj gimnazioj. La episkopo Petri eldonis nun tiun ĉi ordonon por la ĉedanub-distrikta kalvinanaj ĉefgimnazioj.

Gazetaro.

LA BATAILLE. Paris. N-ro 1854 de 12. dec. Francilingva sindikalista ĵurnalo. Enhavas artikolon pri „granda internaciisto Zamenhof“ kun bildo de la majstro.

LES NOUVELLES. Alger (N.-Afriko). Ĉiutaga vespera ĵurnalo. N-ro de 12. dec. kun traduko de letero el Ameriko de A. S. Vinzent el Intern. Esp. Servo en ET. N-ro de 16. dec. kun raporto pri „Esperanto universala lingvo“ ĉe la Ligo de Nacioj.

MULTES JÓVÓ, hebrea hungarlingva revuo, menciis ET kaj la „Leteron el Palestino“ (IES).

FINNA GAZETARO. Dum la pasinta novembro la finna gazetaro enhavis ĉ. 70 artikolojn kaj novaĵojn pri la Esp. movado. Vere imitinda ekzemplo al alilandaj gazetoj. La ĝenerala opinio en Finnlando estas tre simpatia al Esp.

OSTTHÜRINGER TRIBÜNE, Gera (Germ.), de 15. dec., kun artikolo „Al Esp. la estontecon!“.

VOLKSZEITUNG. Bromberg (Polio). N-roj 21 kaj 22 kun artikoloj pri Esp.

DER OBERSCHLESIER (La Suprasileziano), sendependa gazeto suprasilezia en Oppeln, tre favoras Esperanton kaj represis en sia n-ro de 11. dec. bonegan artikolon de s-ano Mieler pri „Esperanto, lingvo de paco“, kiu ampleksas pli ol unu (grandformatan) paĝon. Depost 1921 ĝi regule aperigas Esp. kurson en germana kaj pola lingvoj.

Grafologio.

Gesamideanoj dezirantaj ricevi certan, sciencan respondon pri siaj karaktero, emoj kaj kvalitoj, sendu 2-paĝan leteron, nature kaj senprezinta skribitan (nek dikte nek kopie) al GRAFOS, Casella postale 47, PISA (Ital.) ĉesandante 1 ital. lir. (en nacia mono laŭ nuntempa kurzo aŭ resp.-kup.) por respond-elspezo k. a. (sciigo laŭdeziro ankaŭ pseŭdonimon krom la subskribo!) La respondoj laŭvice aperos en ET.

Respondoj.

JUSSI. Forta kaj trudema volo, klereco, spriteco, fantazio, aktiveco, fervoro, firmeco, ĉarmo, malavaremo, sentemo, ofendigeemo, la vanteo, bonfarto.

PARIZO. Klara intelekto, forta volo, voluptamo, egoismo, sinkaŝemo, diplomatio, certa sukceso dum la vivo. — Sendube ni deziras ricevi aprobsignojn de la demandintoj.

HAGESSO. Bona kaj klara, ne tre agema intelekto, logiko, klaraj ideoj, imagemo, spriteco, persistemo, delikateco, dolĉeco, simpleco, sentemo, vanteo, neforto.

VILAGANO. Firma, tre logika kaj tre aktiva inteligenteco, energio, persista volo, praktikeco, lojaleco, sindonemo, simpleco, forta sentemo, fervoro, voluptamo, disputemo, subita decidemo. Bonfarto kaj juĉemo. — Komprenebla ni volonte ekzamenas ĉies karakteron: tamen ni preferas skribajojn en Esperanto.

AL ĈIUJ. Bonvolu pliatenti la skrib-kondiĉojn.

Internacia Esperanto-Servo.

LETERO EL POLIO.

Bromberg-Bydgoszcz, decembro 1920.

Por Polio ŝajnas nun ankaŭ veni la tempo, kiam ekregos paco. Prave oni rajtas diri, ke la mondilito komencis sur pola tero kaj ŝajne ankaŭ trovos ĉi tie sian finon. La pac-kontrakto kun la bolsĉevistoj ankoraŭ ne estas subskribita, kaj oni atendas surprizojn flanke de la bolsĉevistoj; tamen fakte estas, ke provizore ripozas la armiloj ĉe la pola-rusa fronto.

Sed novaj bataloj komencas! Ne tiuj kun murdmanoj kaj similaj bataliloj, — komencas la

spiritaj bataladoj, kiuj jam de longe okupas la kapojn de la Polianoj. Danzig, Wilna, Supra Silezio! Jen tri problemoj, por kiuj oni jam faris kaj faras multe da bruo.

La unua problemo, nome pri Danzig, ŝajnas esti pli malpli bone solvita por Polio. Kvankam la pola registaro deziris ricevi la regadon pri la Danzig'a Liberŝtato, tamen oni nur atingis la militan protektaĵon en Danzig.

Pli gravigas jam la afero pri Wilna. Antaŭ tiu tempo, tuj post la pola-rusa batalhaligo, aperis tute subite generalo Zeligowski kun sia armeo, simile al la itala heroo d'Annunzio, konkiris la iaman litovan ĉefurbon Wilna kaj volis nun krei polan-litovan liberŝtaton. Por eviti malagrablaĵojn, la pola registaro kaj la litova registaro en Kovno transdonis la Wilna-aferon al la Ligo de la Popoloj, kiu decidis okazigi voĉdonadon en Wilna. Plej proksima tempo montras, al kiu apartenas Wilna. Paca solvo por ambaŭ ŝtatoj estas tre dezirata.

La plej grava sed ankaŭ la plej malfacila problemosolvo estos la lasta de supre nomitaj: Supra Silezio! Ankaŭ ĉi tie okazos laŭ deziro kaj ordono de Ligo de la Popoloj voĉdonado, kaj tio laŭ lasta komunikado en la fino de januaro 1921. Por kiu de ambaŭ ŝtatoj, ĉu por Polio aŭ Germanio, la rezultato de la voĉdonado estos favora, oni hodiaŭ ankoraŭ ne povas diveni. Nur unu oni scias precize, ke la batalo pri Supra Silezio estos tre akra. „Ni ne donos Supran Silezion!“ diras la germanoj. „Nia ĝi estas!“ respondas la poloj. Kaj vere grandan materialan utilon ĝi alportas aŭ alportos por ĉiu de ambaŭ ŝtatoj. Bona solvo de la Supra Silezia problemo devas esti ne nur en la intereso de Polio, sed ankaŭ de Germanio; kaj ju pli bone tiu solvo por ambaŭ landoj estos, des pli frue oni forigos la okazon por novaj militoj.

FRANCISKO PRENGEL.

LETERO EL STIRIO.

Graz, antaŭ Kristmasko 1920.

Vizitanto de la ĉefstacidomo en Graz nepre rimarkos la aronj da difektitaj vagonoj kun florumamitaj fenestroj, kun sekiĝintaj lavitajoj pendantaj de la vagontegmenoj. En ĉi tiuj vagonoj nun jam pli longe ol unu jaron loĝas mizeraj riĉuloj, kiujn malamo kaj ŝovinismo forkurigis el iliaj hejmoj en Suda Stirio. La malfeliĉuloj forlasis ĉiun sian havon, nenion posedas, nur kiom ili portis da vestaĵoj sur la korpo, da mono en la poŝo. Kaj tio estis malmulte. Nun ili loĝas en ruinigitaj vagonoj, kuŝas po du kaj po tri en unu lito, ne povas varmigi la vagonojn, ĉar tencoj da fendetoj de la vandoj enpenetras malvarmo kaj la fenestroj malbone aŭ tute ne estas ŝloseblaj. La gepatroj devas labori la tutan tagon kaj ne povas prizorgi la infanojn, kiuj ludas kaj krias en la polvo de la stratoj. Korpo kaj animo de l' infanoj tiel difektigas. Tuberkulozo kaj rakito estas daŭraj gastoj, en plimulto de l' vagonoj ankaŭ malsato. La malvarmo de la lastaj semajnoj multobligis la mizeron de ĉi tiuj malfeliĉuloj.

Kiam jam dum la milito ĉiuj prezoj dek-kaj dudekobligis, oni fondis t. n. „popolkuirejojn“, en kiuj oni ricevas je malaltaj prezoj tagmanĝon. De post la revolucio, kiu alportis la alivalorigon de ĉiuj valoroj, tiuj popolkuirejoj estas la riĉejoj de ĉiuj, kiujn la prezaltiĝoj pelis el la gastejoj, kiujn malriĉigis la milito kaj precipe la revolucio. Kaj kiuj estas tiuj ĉi? Studentoj ne subtenataj de plenplena moniulo patra, eksoficeroj, oficistoj, kies monataj salajroj apenaŭ atingas la semajnan salajron de helplaboristo, pensuloj k. s. Kaj la manĝaĵoj? Ĉiu fremdulo, kiu vizitas Graz, vizitu tian popolkuirejon. Tie li povas iomete imagi la mizeron regantan en nia lando. Graso estas uzata nur en malgrandaj kvantetoj, kaj la kuliristinoj apenaŭ atentas la necesan purecon; per unu vorto: terure! Hispana samideano, je lasta Pentekost-restante en nia urbo kaj kondukite en popolkuirejon, diris pri farunaĵo: „Pli volonte morti ol manĝi tion!“ Kaj tamen manĝas tion ekz. nur en unu kuirejo pli ol du mil homoj ĉiutage.

La infanoj! Kiun krimon faris la etuloj, ke ili devas porti plej peze la sekvojn de l' milito? Kiom ili suferis dum la kvinjara blokado, estas nepriskribebla. El vigloj, ruĝvangaĵoj kaj lumokulaj hometoj fariĝis palvizaĝaj, lacaj estaĵoj. La gaja kantado de infanoj nun estas malofaĵo. El 10000 gelernantoj (infanoj 6—14 jara) pli ol 800 neniam ricevas matenmanĝon, pli ol 2800 nur sekan panon, pli ol 3500 nur akvosupon. Certe gastigis homamaj familioj en Svisujo, Nederlando, Germanujo, Svedujo kaj lialuĵo infanojn ĉi, sed sur por kelkaj monatoj. La infanoj revenis, plipezantaj, sed post kelkaj semajnoj estis ili kiaj antaŭ la gastigo. Tuberkulozo, rakito kaj malsato okupas la korpojn de l' infanoj kaj ne plu volas forlasi ilin.

Josef Mader.

NOTO. Kiu publikigos tion en nacilingva gazeto, kaj sendos al mi (Schönaustraße 6/II, Esperanto-oficejo, GRAZ, Aŭstrio, Stirio), la numeron de l' gazeto enhavanta ĉi supran artikolon, ricevos ilustritan gvidlibron tra Graz.

Atentigo.

Responde al la artikoloj „La Granda Horoj“ kaj „Por la Bataliloj!“ en n-ro 9 de ET alvenis skribajoj de esperantistoj kaj idistoj. Sed la per ili esprimitaj opinioj konvinkis min, ke la „granda horoj“ ankoraŭ ne estas veninta. Tial mi deziras ne plu menci la aferon en ET, kaj mi petas la sendintojn ne postuli la publikigon de siaj artikoloj por ne elvoki polemikon.

T. B.

Internacia Foiro de Breslau

Printempa Foiro
5-a ĝis 8-a Aprilo 1921

Teksaĵoj, vestaĵoj, ornam- kaj bijuteri-komercaĵoj, or- kaj arĝentaĵoj, armetio, mastrumadartikloj, mebloj, ludiloj, papero kaj paperaĵoj, nutraĵoj, drogoj kaj kemiaj produktaĵoj.

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

Esperanto-fako

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

Recenzojo.

LIBROJ.

BES'a ADRESARO de l' esperantistoj en ĉiuj landoj. Eldonita de Bohema Esp. Servo, Moravany (Bohemujo). Prezo 1.50 fk. (6 mk.).

La bele aranĝita libreto enhavas la adresojn de 1200 esperantistoj en la tuta mondo, inter ili pli ol 500 en Ĉeĥoslovakio. La ideo eldoni adresaron de individuaj esperantistoj estis certe kuraĝa kaj laŭdinda, kaj se fakte ĉiu enpresito pagis kaj mendis la libreton, kion oni povas supozi, la eldono estas bazita sur sufiĉa financa fundamento. Tamen la adresaro estas ankoraŭ tre nekompleta. Kalkulante la tufan nunan aktivan esperantistaron je 12000 personoj, oni havas en la BES'a adresaro nur dekonon de la esperantistaj adresoj. Do la titolo „adresaro de l' esperantistoj“ estas eble iom erariga. Oni povas deziri, ke ankaŭ la ceteraj neŭ dekonoj de la esperantistoj aliĝu al la adresaro, por ke ĝi fariĝu plej komplementa kaj por ke la titolo estu laŭvera.

ESPERANTO-LERNOLIBRO POR RUĴOJ. S-ano P. Medem en Kovno petas nin korekti, ke la Esp. Lernolibro por Ruĵoj (recenzita en ET n-ro 9) estas verkita ne sole de li, sed de V. Dmitriev kaj P. Medem.

GAZETOJ.

BULGARA ESPERANTISTO. Nov.

En bulgara lingvo kaj en Esp.

ESPERANTO de UEA. Dec.

Tre interesa numero por la raportoj pri la Ligo de Nacioj, el kiuj ni represis partojn. — Pri japana kulturo. — Artikolo pri Komensky, „profeto pri mondlingvo en 1641“. — Kroniko ktp.

FRANCA ESPERANTISTO. Dec.

Leginda artikolo dulingva „Progresemo kaj ŝanĝemo“. Ekstrakto el artikolo de E. Archdeacon en „Tribune de Genève“ pri „Esp. kaj la institucioj internaciaj“. Respondo de la sama aŭtoro al kontraŭ-Esperanta artikolo.

GERMANA ESPERANTISTO. Dec.

Bona artikolo germanlingva de Georg Habelok pri „Esperanto kaj fervojistoj“ kaj de studo-konsilisto Lohmann pri „Esperanto kaj pli alta lernejo“. En artikolo „Inter ni“ s-ro E. A. aludas la artikolon en ET n-ro 9, kiujn li erarkomprenis. — Entute la gazeto pliserioziĝas, pri kio oni povas sincere ĝoĝi.

KRISTANA ESPERO. N-ro 4.

Intralie rakonto de H. P. pri lia vojaĝo al la Haga kongreso. En la rubriko „Revuoj ricevitaj“ ni ne trovis nian ĵurnalon, kiun tamen ni regule sendis al la redakcio de K. E. En 1921 la revuo eliros dumonate.

LA PROGRESO. Okt. kaj nov.

La unuaj numeroj, kiuj nin atingis de la ĉeĥoslovaka organo esperantista, kiu — laŭ nia percepto — estas sufiĉe naciema. La revuo estas redaktata tute en Esp. MITTELUNGEN, Haida (Ĉeĥosl.). Dec.

Kun raportoj germanlingvaj pri komitatitaj kunsidoj kaj kun Esp. kroniko.

Filatelio.

HISPANIO. Kaŭze de la en Madrid okazinta mondpoŝta kongreso aperis 15 novaj pm. (1 cent. ĝis 10 peseta).

LETONIO (Latvio). Pm. de la „Ruĝa Kruco“: 20 (50) kap. bruna kaj ruĝa, 40 (55) kap. malhelblua kaj ruĝa, 50 (70) kap. nigra-verda kaj ruĝa, 1 (1,30) r. ardezkolora kaj ruĝa.

LITOVIO. Aperis nova pm-serio kun enskribo STEIGIAMASIS SEIMAS: 10 sk. roza (kavaliro), 15 (kavaliro), 20 malhelverda (prince Vytautas), 50 helbruna (rajdato), 40 grizverda-violkolora (prince Gediminas), 50 oranĝflava-bruna (Vytautas), 60 oranĝflava-ruĝa (Vytautas), 80 griznigra-ru (Gediminas), 1 mk. flava-nigra (Sankta Kverko kun oferaĵoj), 3 mk. helverda-nigra (kverko), 5 mk. siringviol-nigra (kverko).

NEDERLANDO. Kun surstampo 2,50 oni eldonis la malnovajn (neuzatajn) 10 guldenajn pm. kiel 2,50 guldenajn pm.

POLIO. La nun uzata serio pliriĉiĝis per la jenaj valoroj: 3 mk. brunruĝa, 6 mk. ruĝa, 10 mk. brunruĝa, 20 mk. olivverda. (Ĉiuj havas la saman desegnaĵon kiel la 5 marka pm.) La 1 marka pm. aperas nun helruĝokolora kun aglo-desegnaĵo. (kiel la 5 f.). Tutaĵo: 50 f.-poŝtkarto. SVEDIO. 60 ĉre malhelviolkolora, 80 bluverda, 1,40 kr. nigra. Kiel aerpoŝtaj markoj aperis la oficoŝtampoj kun surpreso LUFTPOST: 10 sur 3 ĉ. helblua, 20 sur 2 ĉ. flava, 50 sur 4 ĉ. violkolora.

Postkongreso kaj landa kongreso en Budapeŝt 1921.

La fremdul-oficejo de Budapeŝt intencas pro la tie okazonta postkongreso esperantista eldoni novan gvidilon tra Budapeŝt en Esperanto. Partoprenontoj alilandaj jam nun sciigu ĉefsekretariojn Aleksandro Laquer, VII, Kiraly u. 67 - II. De Praha oni vologas tien kune.

Anoncetoj.

FELIĈAN NOVJARON al ĉiuj esperantistoj-amikoj deziras S. J. Degenkamp en Utrecht (Nederlando).

VENDAS al intersanĝas kontraŭ poŝtkartoj: Internacia Revuo Medicina 1906. La Revuo 1-a kaj 2-a jaro 1906-1908. Esperantistische Mitteilungen 1904 (antaŭanto de Germana Esperantisto). La Esperantisto 1912; ĉiuj kompletaj, ne-binditaj; plus pli ol 1000 div. Esp. sigelmarkoj (eĉ el la malnovaj!). Proponoj al P. Tarnow, Kiel (Germanio), Olshausenstr. 18.

PROPAGANDO. Willy Sieler, fervojisto, Gera-R. (Germ.), Friedericstr. 4, pro propagandaj celoj deziras ricevi germanlingvajn tag-gazetojn, kiuj enhavas anoncojn aŭ recenziojn pri Esperanto.

POŝTKARTOJ ilustritaj pri Budapeŝt kun Esp. teksto haveblaj ĉe Hungara Esp. Servo, P. Balkanyi, VI, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt (Hung.).

BIALYSTOK, la Zamenhofa naskiĝurbo. 4 div. korigitaj vidajoj kun Esp. teksto estas riceveblaj por 5 resp. kup. Adresu: J. Sapiro, Lipowa 55, Bialystok (Pol.).

ESPERANTAN RIMARON, ankaŭ uzitan, mi deziras tuj aĉeti. Bonvolu sendi ofertojn kun prezo al s-ro Leono Funken, Floriansmarkt 7a, Kolonjo, Germ.

ESPERANTO-EKSPOZICIO. Por aranĝi ĉiun, mi petas pri afabla alsendo de PK il., L. Esp. gazetoj, reklamiloj ktp. el ĉiuj landoj. Je via alsendo bonvolu diri al mi vian dezirojn, kion vi deziras intersanĝe. R. Hoerber, Mannheim (Germ.), Seckenheimer Str. 51. Del. de UEA.

KOLEKTISTOJ! Mi vendas 25 malsamajn n-rojn de „La Spritulo“. Sendu proponojn al s-ro Max Butin, Godesberg (Rheinland), Germ., Kronprinzenstr. 55.

KOLEKTANTOJ DE HELPMONO! Mi deziras prezarojn de ĉiulandaj helpmono, precipe de Germanujo (Orientprusio 1914, helpmono de la militkapitejoj, porcelanmono de Meissen ktp.). Intersanĝas kontraŭ aŭstria helpmono. O. Paril, Postfach 46, Graz (Aŭstrio).

KOMERCISTOJ! el ĉiuj landoj, kiuj deziras aĉeti francajn komercaĵojn kaj produktaĵojn, turnu vin al s-ro Maurice Ladrière, 6, rue Auguste Chabrières, Paris 15-e (Franc.). OFICO. 50-jara pola samideano, 15-jara praktiko komerca kaj oficeja, 4 lingvoj, sporta komercisto, unuagrada atestejo kaj rekomendoj, serĉas oficon kun certa estonteco en iu lando. Havigos rekompencon al kiu helpas en tiu serĉo. — Ofertojn oni dumo povas direkti laŭ adreso de Adolfo Oberroman, del. UEA, Varsovio (Pol.), Krak-Przedm. 10.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERSANĜI:

S-ro Jorma E. Partanen, kiu antaŭe loĝis en Uusikaupunki, estas transloĝinta al Tampere, kaj ree deziras korespondadi per li. poŝtkartoj kaj leroj kun ĉiuj landoj. La novaj kaj malnovaj korespondantoj notu do bonvole lian novan adreson.

S-ano Francisco Pregel, Bydgoszcz (Polio), Podgorze 17, intersanĝas Esp. gazetojn, postmarkojn, gvidilbrojn. Samideanoj el ĉiuj landoj sendu priskribon de via literaturo, muziko ktp. (rakontojn, novelojn). Mi iradokos lin por la ĉi tie pola kaj germana gazetaro. Servu ĉiamaniere al via lando kaj nia kara lingvo!

Dezirantoj korespondadi, interesuloj pri Siberio, pri Rusio, pri regado de Kolĉak kaj aliaj generaloj, povas komenci interkorespondadon kun s-ro B. Najdin, Kuzneckaja 65, Omsk, Siberio.

Manuel Madeira, rua Heliodoro Salgado, c r s/c Lisboa, Portugalio, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj; ciam respondas.

Walter Rose, Hagen i. W., Eppenhäusen 2, deziras korespondi kun la tuta mondo per PK kaj P; intersanĝi aŭ aĉeti ĉiujn specojn de poŝtkartoj kaj sigelmarkoj, kiel aliaj Esp. specialaĵoj.

Kurt Ostermann, fervojisto, Blücherstr. 55, II, Gera (Reuss, Germ.), deziras intersanĝi Esp. gazetojn kun ĉiuj landoj. Sinjorino Mühlpfordt, Merseburg/Saale (Germ.), Neumarkt, Zigarrenfabrik, deziras intersanĝi poŝtkartojn.

Friedrich Koehler, kontrolisto, Frankfurt a. M.-Süd, Grosse Bittergasse 88, Pl kaj L pri aktualaj temoj.

Willy Freyzeisen, bankoficisto, Frankfurt a. M.-Süd, Pl. L pri aktualaj temoj, ankaŭ en angla, franca kaj itala lingvoj.

F-ino Martha Schauerer, Frankfurt a. M.-Süd, Kranachstr. 14, sole per Pl.

F-ino Tilly Kraus, Frankfurt a. M.-Süd, Textorstrasse 91, II, sole per Pl kun ĉiuj landoj.

Dömötör Fedorcsak, Budapeŝt V, Nador utca 27, deziras korespondi per Pl.

S-ro d-ro Stefano Bodnar, Budapeŝt IX, Mester u. 5, deziras korespondi per PK, Pl kaj L, prefere kun kuracistoj kaj denikuracistoj, kaj intersanĝi PM.

S-ro Rudolf Leopold, komercisto, Hirschfelde (Saksujo, Germ.), deziras korespondi kun sinjorino el Finnlando, Svedujo aŭ Rusujo.

Heinrich Lorenz, Koblenz (Germ.), Bahnhofstr. 25, deziras korespondi kun anoj de ĉiuj landoj; ĉiuj karto estos respondota. Mi ankaŭ intersanĝas poŝtkartojn kaj sendas por ricevitaj stampitaj markoj la saman kvanton da germanaj stampitaj poŝtkartoj.

Stuttgart (Germ.), Hans Böhring, Libanonstr. 45, sendas por PM intersanĝi PM, Pl, EG, PK kaj Lbr.

Stuttgart (Germ.), Hans Wolf, Heschl Hahnstr. 60, sendas por PM intersanĝi PM, Pl.

Stuttgart (Germ.), Wilh. Gutmann, Landhausstr. 55 B, intersanĝas PM.

Stuttgart (Germ.), Jakob Mack, Römersstr. 58, intersanĝas PM.

Stuttgart (Germ.), Max Schuon, Reg.-Baumeister, Ostheim-Louisenplatz 6, intersanĝas nur virmenbergajn PM.

Paul Mühe, Hagen i. W. (Germ.), Minervastr. 1, deziras intersanĝi ĉiulandajn il. PK kaj L kun samideanoj.

4 junaj, blindaj samideanoj deziras korespondi kun ĉiulandaj vidantoj kaj blinduloj. Adreso: Budapeŝt VII, Mexikblstr. 60, laŭlede Instituto por Blinduloj.

Ĉiuj produktoj por ĉiuj landoj

H. Bidaux

Esperantista Fermo.

Speciala Fako en:

NUTRAJ PRODUKTAĴOJ — LIKVOROJ
— VAKSKANDELOJ —
ŜNUROJ — ŜNURETOJ — PARFUMARO
— FABRIKITAJ PRODUKTAĴOJ. —

S-ro H. Bidaux, Paris 12-e
5 - Place d'Aligre.



4^a Internacia Foiro de Frankfurt a. Main.

Printempa foiro: 10-16 aprilo 1921.

Ampleksa ekspozicio de 50 branĉoj.

Programo:

Importo kaj Eksporto.

Acclado kaj rekonstruado de la internacia intersanĝo de komercaĵoj.

Prospektoj en germana, angla, franca, itala, hispana, dana, norvega, holanda, sveda lingvoj
:: :: :: kaj en Esperanto. :: :: ::

Korespondado en Esperanto!

Komence de januaro aperos la „Antaŭ-Katalogo“, laŭbranca nomaro de la ekspozicioj, aliĝintaj ĝis la 31 decembro 1920, kun plurlingva registro.

Oni petu tuj presajojn aŭ detalajn informojn de Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M. (Germ.).

Ĉiuspecaj

Cigarbruligiloj

Karbidlampoj

— Eksporto. —

Muscat & Ehrstein Nürnberg (Bavarujo)

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

— Esperanto korespondanta. —

E. E. A. S.

La Provizora Komitato de „Esperanta Eldona Akcia Societo“ devis ĉesigi por kelka tempo sian agadon pro politikaj cirkonstancoj en Polujo, sed nun, kiam la vivo revenas en siajn pacajn relinojn, ĝi denove turnas sin al la tutmonda samideanaro por plua helpo en realigo de ĝiaj celoj.

Ankoraŭ kelkcent da nevenditaj akcioj restis. Kiu volas plifortiĝi nian propagandon kaj havi realan profiton, tiu rapidu aĉeti la restintajn akciojn. Eldonistoj, kiuj intencas eldonadi esperantistojn, bonvolu sin turni al EEAS, kiu je tre malaltaj prezoj liveros al ili menditajn.

Personoj, al kiuj EEAS sin turnis kun propono fariĝi ĝia reprezentanto, bonvolu tuj respondi. Reprezentantoj bonvolu tuj sendi la kolektitajn ĝis nun aliĝilojn.

Pri informoj kaj detaloj turnu Vin, aldonante respondopordon, laŭ jena adreso: Ksav. A.Huf., por EEAS, Krakow, str. Pedzichow 22, Polujo.

La Provizora Komitato de EEAS.